★ NORDA GAZETO

DUMONATA BULTENO
DE LA
NORDFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

Redaktoro kaj responda eldonanto :
Lucien BOURGOIS,
25, rue Gambetta,
62 - NOYELLES-GODAULT, Tél. : 59.

Kotizoj (kun bultenservo) :

a) Junuloj : 2 F.
b) Aktiva membreco : 3 F.
c) Subtenanto : 5 F.

Fédération Espérantiste du Nord de la France
17, Rue des Bouvreuils, 62 - ARRAS.
C.C.P. LILLE 517-15.

Ĝenerala Sekretario : Fernand DITACROUTE, 178, Chemin Castre, 62 - CALAIS.

Informilo n-ro 2 — Marto-Aprilo 1966

# INVITO AL LA FEDERACIA KONGRESO!

Estimataj Gesamideanoj,

La NFEF elkore invitas vin honori per ĉeesto ĝian jarkongreson, kiu okazos la dimanĉon 8-an de Majo 1966 ĉe la Lille-Foiro.

| | |
|---|---|
| 10-a h. | Rendevuo en la Salono C - libera konversacio. |
| 10.30 h. | Malfermo de la kongreso (en la sama salono). |
| 12-a h. | Oficiala akcepto. |
| 12.30 h. | Komuna Tagmanĝo (laŭvola). Prezo : 15 F. |
| Posttagmeze | Liberaj konversacioj aŭ vizito de la foiro. |

Bankedo : Partoprenontoj bonvole avertu la Ĝeneralan Sekretarion, S-ro DITACROUTE. Nepre enskribiĝu antaŭ la 2-a de Majo!

Se dezirate, vi povas antaŭpagi al lia pĉk. : CCP LILLE 2303-96.

NB : La kunsendita karto signita per la federacia stampo validas kiel senpaga foirenirilo. Pliajn havigas kontraŭ reafranko :

S-ro René CURNELLE,
26, Rue des Martyrs-de-la-Résistance,
59 - LAMBERSART.

Kalendaro de la ĉefaj Esperanto-Renkontiĝoj (Aldono)

8 Majo 66 : Jarkongreso de Nordfranca Esperanto-Federacio en LILLE.
28-29-30 Majo 66 : 48-a Kongreso de Belga Esperanto-Federacio en LOUVAIN. Aliĝilojn havigas : S-ino MEURRENS, Naamestraat, LOUVAIN (Belgujo).

Pri la aliaj Esperanto-kongresoj, vd. la paĝon 2 de la jan[illegible] bulteno.

Kongreso en Budapeŝto :

Samkiel U.F.E., ankaŭ Belga Esperanto-Federacio aranĝas karavanon al Budapeŝto. Respondecas : S-ro MAERTENS G., 51 Pr. Leopoldstraat, St KRUIS (Belgujo).

Raporto pri la federacia printempa renkontiĝo en MERICOURT :

La 27-an de Marto, ĉirkaŭ 30 partoprenis la nun tradician printempan renkontiĝon en Méricourt.

Ĉu vere printempa oni povus ĝin nomi ? Ĉar, bedaŭrinde, la vetero ne superfavoris nin k la ventego tre certe estis la kaŭzo de la malmulta partopreno. La rendevuejo estis la Medicin-Sociala Centro, kie de la 10-a ĝis la 12-a liberaj konversacioj permesis al ĉiuj interŝanĝi utilajn vidpunktojn.

Je la 12-a, ni estis afable akceptitaj de la urbestraro per honorvino. La vicurbestro, S-ro DUBOIS, senkulpigis la urbestron, S-ro HOTTE, detenatan kaj esprimis sian bonvenigon, tostante je la sukceso de Esperanto, kiu akcelas harmonion inter la popoloj. S-anino Van PARYS, magistratino, kelkvorte formulis la esperon pri enkonduko de la Internacia Lingvo en la Urbestraron. Li aldonis, ke la esperantistoj ĉiam plezure retroviĝos en Méricourt dum la venontaj jaroj.

Post la kunmanĝo ĉe Kafejo HERMANT, ni revenis al la kunvenejo por mallonga laborkunsido.

S-ro ODENT unue senkulpigis kelkajn federacianojn : F-inoj MAUCHIEN kaj LECLERCQ, Ges-roj BEN WEBER, BONVOISIN, BUERICK, HENIN k S-ro RINGOTTE. Li invitis ĉiujn partopreni la Federacian Kongreson en LILLE, la 8-an de Majo k la aŭtunan renkontiĝon, kiu verŝajne okazos en VALENCIENNES dum oktobro. Ankaŭ, li menciis la pentekostajn renkontiĝojn : Nacia UEF-Kongreso en AGEN, Belga en LOUVAIN, Brita en NORWICH.

La Prezidanto fine akcentis la neceson krei apartan fonduson por la propagando, ĉar la kotizoj ne sufiĉas por fronti ĉiujn niajn elspezojn.

Poste, okazis la distra programero : tre interesa - kaj samtempe instrua - demandludo, gvidata de nia amiko Lucien GILOTEAUX, kontraŭmetis plurajn intelektajn teamojn.

Je la 17-a, ĉiuj disiĝis, kontentaj pri la agrabla tago pasigita kune, en gaja etoso, spite la veteraĉon.

Ĝis revido en LILLE !

Fernand DITACROUTE.

Ni bonvenigas la jenan novan Membron :

F-ino TOMIALOJE M.A., Instruistino,
81, Cité Mousseron,
59 - DOUCHY-les-MINES.

Eĥo pri niaj danaj geamikoj : Ges-roj Karen kaj Stig B. SKOLE aĉetis domon en Danlando, meze de la duoninsulo JUTLANDO, inter lagoj kaj montoj.
Nova adreso : LAVEN St. (Jylland) - DANLANDO.

NIA VIVO :

CALAIS : La loka "Kultura Centro Esperanto" regule aperigas artikolojn pri Esperanto en "Nord-Littoral". Ni menciu interalie la numerojn jenajn :
10/2/66 - kun foto de la komitato de "Centre Culturel Calaisien Esperanto", sekcio de la "Kultura Centro Kalezia".
26/2/66 - kun foto de Jacqueline CAURAT intervjuanta sur la ekraneto S-anon Jack ROUSSEAU en la kadro de la kroniko "Telefilatelo".
27/2/66 - kun foto de kelkaj el la 48 poŝtmarkoj pri Esperanto jam emisiitaj.
2/3/66 - kun foto de la partoprenintoj de la ĝenerala kunveno de "Centre Culturel Calaisien Esperanto", en ĉeesto de S-roj BARAS, Prezidanto de "Kultura Centro Kalezia", de S-ano BIGOURD, Ĉefadvokato ĉe la Ordeno de Advokatoj en St OMER, kaj S-ro BOURDEAUX, Respondeculo de la Gazetara Servo de U.F.E.
Ankaŭ "La Voix du Nord" raportis pri tiu kunveno.

DOUCHY-les-MINES : F-ino TOMIALOJE kolektis 22 subskribojn de instruistinoj por la UEA-propono al Uno. Ni varme gratulas!

VALENCIENNES : En la diversaj regionaj ĵurnaloj : "Le Courrier", "La Croix du Nord", "Nord-Matin", "La Voix du Nord", aperis kun foto raporto pri la jarkunveno de la Esperanto-Grupo.
Ĝi mencias Esperantokursojn ĉe la knaba lernejo de Cariot, ĉe la knabina lernejo de "la plaine de Mons", en ROEUX kaj en LOURCHES.
Por 1967 estas planita la malfermo de kurso en ANZIN.
Okaze de tiu kunveno la ĉeestantoj vidis filmojn pri DUREN, urbo en Federacia Germanujo ĝemeligita kun VALENCIENNES sur la esperantista kampo.

Bona propagandartikolo, kiu - espereble - vekos intereson en la neesperantistaj medioj kaj ebligos al tiu jam vigla grupo la varbadon de novaj membroj.

RADIO :

Pola Radio - Esperantaj disaŭdigoj - VARSOVIO (Pollando).
Skribante al la ĉi supra adreso, vi ricevos senpage la ilustritan programon pri ĝiaj ĉiutagaj elsendoj (ĝi validas de aprilo ĝis oktobro).
Radio BUDAPEŜTO elsendas ĉiutage en Esperanto, de la horo 20.30 ĝis 20.45, laŭ la jenaj ondolongoj : 240 m, 41,6 m, 48,1 m; kaj disaŭdigas komunikojn pri la nunjara Universala Kongreso de Esperanto.
Radio Budapest / Redakcio de la Esperanto-dissendoj,
Brody Sandor u. 5/7 - BUDAPEST VIII (Hungarujo).

IV - VOLAPUKO (daŭrigo)

Tamen dekjara aplikado k praktiko de Volapuko sufiĉis por elmontri ties lingvajn mankojn. Ne sufiĉis ĝia struktura simileco kun la naturaj lingvoj por certigi ĝian venkon.

Kvankam simpla, ĝia gramatiko enhavis multajn superfluajn formojn. La unua diplimita volapukoprofesoro, Karl LENZE, asertis, ke en tiu lingvo oni povis derivi 505.440 formojn de unu verbo! Kiom multe!

La redukto de la vortoj apartenantaj al la eŭropaj lingvoj, kiuj konsistigis la fundamentan vorttrezoron, atingis tian gradon, ke iafoje ne plu estis rekonebla la origina vorto el la restanta silabo.

Konklude, la arbitre elpensita vortprovizo k la tro multaj gramatikaj formoj igis malfacila la studadon de tiu lingvo k ties uzadon komplika.

Estus tamen eraro kredi, ke la lingvaj mankoj, kune kun la malfacilaĵoj kaŭzitaj de la tro artefarita k arbitra fundamento de la vortprovizo, estis la decidigaj k ĉefaj kaŭzoj en la fiasko de tiu lingvo.

La kaŭzoj estis pli gravaj k profundaj. La kreinto de Esperanto, D-ro ZAMENHOF, precize determinis ilin :

"Volapuko fiaskis, li diris en parolado elparolita dum la 7-a Universala Kongreso de Esperanto, (Antverpeno - 21-an de aŭgusto 1911) pro grava peko : la absoluta manko de propra k natura evoluado."

Efektive, ĉiu formo, ĉiu nova vorto enkondukota en la lingvon dependis de la arbitro de SCHLEYER. Volapuko estis submetita je la decidpovo de ununura persono. Kaj D-ro ZAMENHOF pludiras :

"Se ĉi tiu fundamenta eraro ne estus ekzistinta, neniam Volapuko estus pereinta k verŝajne ni ĉiuj parolus tiun lingvon."

Kia ajn estas la afero, la ĝenerala uzado de Volapuko nepre k tute logike estus evoluiginta ĉi tiun lingvon. Ĝi estus transformiĝinta k pliboniĝinta. La kaŭzo de ĝia disfalo kuŝas ne nur en la arbitraj principoj, sur kiuj staris ĝia fundamento, kiuj principoj senigis la lingvon je normala k natura evoluado. Ankaŭ rezultigis tion la despotismo de SCHLEYER. Li konsideris tiun idiomon kiel "sian" lingvon, "sian" aĵon, "sian" propraĵon k li decidis pri ĉio. La organizaĵo, kiun li fondis por la disvastigo de Volapuko dependis nur de li sola. Li rifuzis ĉiujn proponojn, ĉu individuajn, ĉu opajn, kies aplikado eble estus certiginta al la lingvo normalan evoluadon. Same, la nomumo de la Prezidantoj de Volapukistaj Societoj estis devige submetita je la aprobo de SCHLEYER, kiu ne ĉiam konsentis validigi ĝin.

Sekve, post la sukcesa sed efemera volapukista movado restis, ĉirkaŭ la jaro 1900, nur 159 personoj, kiuj ankoraŭ korespondis per tiu lingvo.

Kiel vidate, la disfalo de Volapuko okazis tiel pro ĝiaj propraj mankoj, kiel pro la netoleremo de ĝia kreinto.

Post la fiasko de Volapuko, la demando pri internacia lingvo ricevis fortegan baton, ŝajne mortigan. Post kelkaj forgesjaroj, tiu demando ree aktualiĝis, kun freŝa forto, kiu montris kiel la solvo de tiu problemo urĝas k fariĝas nepre necesa por la tutmondaj rilatoj k la homara progreso.

Sub la formo de Esperanto, la helplingvo atingis gravegajn sukcesojn, kiuj multe superis la tamen brilajn atingaĵojn de Volapuko.

(sekvota).

Claude VERNAY. Elfrancigis : Lucien BOURGOIS.

---

Bulteno ofsete presita de :
Centre National Espéranto-Office, 9 Bis, Rue du Commandant-de-Poli, 45 - ORLÉANS.
Le Gérant Responsable :
Lucien BOURGOIS, 21, Rue Gambetta, 62 - NOYELLES-GODAULT.